



3-a trimestro 2016

La ĝardencedro de la muzeo pri Belartoj

*En tiu numero
vi legos...*

La ĝardebcedro de la Muzeo pri Belartoj en Tours impresas Jane.	p. 1 ĝis p. 2
Jane raportas pri la vizito de la eksa monaĥejo « La Clarté Dieu ».	p. 3 ĝis p. 4
Jan Rao daŭrigas sian rakonton « esperanta vojo ».	p. 4 ĝis p.6
.Raita Pyhälä vojaĝigas nin ĝis la muzea insulo Seurasaari por partopreni en nordia somermeza festo.	p. 6
Kiam oni vagadas laŭ akvobordo, kiel Caroline, surprizo alvenas !	p.7
Ĉu la kafa rekremento havas estontecon ? Demandas Jeannine kaj Gérard.	p.7 kaj p. 8



Sen nenia ŝovinismo, jen la plej rimarkinda Lebanona cedro, kiun oni povas vidi en la koro de unu el niaj urboj. Ĝi estas rimarkinda pro la loko, kie ĝi staras : la korto de la ĉefepiskopa palaco (17a jarcento), pro siaj teniĝo, simetrio kaj ankaŭ pro sia aĝo, ĉar ĝi estis plantita en 1804. Antaŭe, laŭ la malnovaj tekstoj, la kastelparko de Chanteloup, en Amboise, havis la plej belan Lebanonan cedron, kiun oni povis vidi en Francio post tiu de la Reĝoĝardeno ; bedaŭrinde, ĝi malaperis post la vendo de la kastelo. Sammaniere, en 1839, oni skribis, ke la plej bela cedro el Turangio troviĝis en la kastelparko de Grandmont, (tiu ankaŭ malaperis).

La Lebanona cedro estis kunportita el Anglio al Francio, fare de Jussieu, botanikisto de la ĝardenoj de la Reĝo, ekde 1733. Ĝi estis plantita sur la monteto de la Labyrinthe (labirinto) (fakte amaso el konstruaĵruboj) en la ĝardeno de la naturhistoria muzeo de Parizo. Tiu cedro de Jussieu, kiu venis de la angla botanika ĝardeno de Kew vegetis, ĝis kiam la botanikistfilo, Vespasien Jussieu elterigis ĝin

en 1734 por replanti ĝin fronte al la galerio de paleontologio. Tio klarigas, kial la arbo ne povas rivali kun tiu de Tours. Ĝi estas nur 20 m alta, tiu de Tours 31 m kaj ĝi estas multe pli gracila (4 metrojn ĉirkaŭtrunka).

Ĝi ne havas tiujn malaltajn branĉojn, kiuj donas al tiu de Tours tiun mirigan harmonion. Ekde la enirejo de la Muzeo pri Belartoj, la cedro, branĉoj etenditaj kiel malfermitaj brakoj, akceptas vin kun siaj ses malaltaj branĉoj subapogitaj de fostoj. Estas dikaj branĉoj serpentaspektaj, paralelaj al la grundo, branĉoj, kiujn oni devis subteni ; pro tio, ĝi aspektas estetika kaj eksterkutima. Ĝi ŝajnas inviti vin viziti la belegan ĝardenon. « Vi sendube pensas, ke la Episkopejĝardenoj de Limoges kaj de Avranches estas same akceptemaj ». Jes, evidente, sed tiu de la Ĉefepiskopejo de Tours estas perfekta (Maurice Bedel [moris bedel] La Touraine [la turen]). Ĉu ni devas kredi ĉi tiun aŭtoron (aŭ kulpigi la Nobelpremiiton), kiam li skribis pri nia gigan-



to : « cedro de vastaj proporcioj, kiun Anatole France volis hakigi pretekstante, ke ĝi kaŝis la belan aranĝon de la palacfasado ».

Tiu cedro profitis de la organika grundo el la malnovaj Romiaj kaj Karolidaj fosoj. Sur la malnovaj poŝtkartoj, oni jam taksis la branĉaran ĉirkaŭon je 130 m kaj la trunkan je 7 m. Nun, unu metron alte, ĝi cirkonferencas 7,50 m kaj kovras areon de preskaŭ 800 m². Ĝiaj malaltaj branĉoj transiras la korton preskaŭ ekde la muzea ŝtuparo ĝis la remizo, kie troviĝas la pajloŝtopita elefanto Fritz.

La asocio A.R.B.R.E.S. (arboj) atribuis al ĝi en 2001 la markon « Rimarkinda arbo de Francio ».

Serioze stajita en 1959, oni devis haki du malaltajn branĉojn, nordflanke, en 1963, pro tempesto kaj alian por la samaj kialoj la 15an de Novembro 1969 ; la 24an de Julio 2005, nokte, sen vento, sed kun pluvego, unu el ĝiaj dikaj branĉoj de la pinto falis, damaĝante tiujn malaltajn.

Jane Pinon

La abatejo de la Clarté Dieu (nia vizito, la 24an de Aprilo 2016)

En la milda valo de la Clarie kaj de l'Escotais, okcidente de Saint Patern Racan, oni malkovras la malnovan abatejon de la Clarté Dieu



aŭ pli ĵuste tion kio post restas : granda, alta, malnova kontraŭĵo, kiu fiere, impresas pri tiu malnova abatejo.

Ĉi tie, nin varme akceptas la posedantino Sinjorino Moussette, kiu, dekon da jaroj antaŭ kun sia edzo subite enamiĝis al tiu loko (multe pli vepra ol nun).

Ili igas la konstruaĵon iom post iom legebla por la vizitantoj. Entusiasme kaj ĵoje, Sinjorino Moussette prezentas la abatejon, kiun ŝi



elvokas ekde ĝia konstruaĵo, kiu datiĝas de XIII jarcento, epoko kiam konstruiĝis aliaj abatejoj kaj preĝejoj ; ankoraŭ si rakontas



aliajn okazintaĵojn dum la kuro de la tempo.

Tiu abatejo fondiĝis en 1239 de Ordono de Cîteaux. Dank' al legacio de epikospo Wington de Anglio.

Ĝi travivis ekde 1364 la militaĵoj d'Amaury de Troo, kapitano de Château du Loir.

Sekve, la ruinoj de la klostroj kaj la abatmonaĥero restaŭriĝis ; en la XVIII jarcento la konstruaĵoj disfalis en ruinoj kaj malkonstruiĝis dum la revolucio kaj iĝis senzorga.



El la eksa monaĥejo, grandparte detruita, postrestas la konstruaĵo de la servantaj monaĥoj. Sinjorino Moussette, dank'al sia profunda kono de la loko kaj de la historio, elvokas ĉiupaŝe, la vivon de la monaĥejo, kiu aplikis la regulon de la Ordeno : aŭstereco kaj manlaboro.

Per sia daŭra persistemo, la nunaj posedantoj reaperigas la abatejan planon : persista labo-



ro de formiko por iompostiome forigi la veprojn kaj amasiĝojn de rubaĵoj baze de la preĝejkolonoj aŭ en la klostrokorto.

Ili ankaŭ faras necesajn dokumentajn esplorojn ĉe arkivejo, por konsistigi dosierojn pri peto de monhelpo por la protekto de la Komuna Havaĵo. Asocio de la amikoj de la Clarté Dieu subtenas ilin (organizado de koncertoj...), ili ankaŭ ludonas tiun lokon por diversaj aranĝoj.

Gesinjoroj Moussette daŭrigas siajn profesiojn : skulptaĵoj de la sinjorino, videblaj surloke kaj restaŭrado de malnovaj mebloj fare de la sinjoro.

Tiu vizito estis por mi iom mirinda, ĉar tiun cistercian abatejon mi ĉefe imagis dank'al kelkaj vestiĝoj, zorgege konservitaj de la proprietuloj kaj dank'al la komentarioj pri la komencitaj kaj komencotaj laboroj, S-ino Moussette vivigis min empatie sian pasion por la abatejo de la Clarté Dieu.

Por plie scii, vidu :

www.abbaye-clartedieu.com

Jane kun la helpo de la merkreda grupo

MIA ESPERANTA VOJO (duparto)

Kiam mi sciis, ke la 83-a UK okazus en Montpeliero de Francio, mi estis tre ekscitata, ĉar viziti Parizon, la ĉefan urbon de Francio estis mia sonĝo ekde kiam mi estis infano. Pro tio mi tuj decidis partopreni en la UK kun la sama rapideco kiel mi antaŭe decidis eklerni Esperanton.

Kun granda ĝojo mi venis al Francio kune kun mia instruistino s-ino Gu.

La unua haltejo estis Parizo kie ni vizitis la belan urbon kaj famajn vidindaĵojn akompaninte de Parizaj geesperantistoj. Restis profunda impresoj en mia koro. Sed la plej neforgesebla kaj kortuŝata afero estis la amikeco. En Parizo mi unuan fojon ĝuis la amikecon de Esperantujo. Ni ricevis varman akcepton kaj grandan helpon. Ni ĝuis la varmecon de granda familio en Esperantujo. Ni tranoktis kaj manĝis ĉe la domo de Esper-



antistino. Bedaŭrinde mi ne bone memoras ŝian nomon, ĉar tiam mi estis komencantino kaj mi nur komprenis iomete. La sento estis tute sama kiel hejme, malgraŭ la fakto ke tio estis la unuan fojon ni konatiĝis kun ili. Tia situacio neniam antaŭe okazis ĉe mi.

La dua vizito estas al la urbo Turo kie loĝis Andre Aude, kiu estas amiko de mia instruistino s-ino Gu.



La trajno venis al la stacidomo de Turo. Andre akceptis nin kaj veturigis nin al lia bela domo. Tiam li jam estis pli ol 70 jaraĝa, sed li aspektis tre energia. Li vivis sole. Ĉiutage li kuiris manĝaĵon por ni kaj veturigis nin por viziti diversajn kastelojn kaj vidindaĵojn.



Ankaŭ li invitis aliajn esperantistajn geamikojn el lia regiono por manĝi kune en lia



domo. Ekde tiam mi kun Andre Aude daŭrigis korespondadon ĝis lia forpaso en jaro 2013.



Mi ankaŭ amikiĝis ĝis nun kun Jacques, Marie-France, Gérard, kaj Jeannine.

Tiam kiam mi unua foje vojaĝis en Francio, mi estis komencantino kaj mi ne kapablis bone paroli kaj kompreni Esperanton. Kiam iu demandis ion aŭ mi volis diri ion al aliaj homoj, mi ĉiam petis helpon de mia instruisto s-ino Gu. Ŝi preskaŭ estis mia tradukisto. Tiun situacion Andre rimarkis, kaj li montris en liaj okuloj.

Post nia vizito en Turo, ni devas iri al la urbo Montpeliero por partopreni la 83-a UK-on. Antaŭ nia foriro, Andre diris al mi, ke la UK estastre bona loko por praktiki Esperanton. Li esperis ke post la kongreso mi multe progresus. Samtempe li speciale atentigis min ke mi ne devus ĉiam sekvi sinjorinon Gu dum la UK kaj ke mi devus sole konatiĝi kun aliaj esperantistoj. Mi bone memoris lian bonan konsilon kaj faris laŭ liaj vortoj dum la kongreso. Jes, post la UK mi havis grandan progreson pri nia lingvo. Mi eĉ amikiĝis kun la itala paro Vittorio kaj Luisa kaj kun usona esperantistino Winifred.

Dum la monata vojaĝo en Eŭropo mi ricevis grandan frukton kaj ne anticipitan rezulton.

Unue, mi tute bone eksciis, ke Esperanto estas utila kaj neŭtrala lingvo. En la kongreso mi spertis la solenan inaŭguran scenon sen traduko kaj mi propra okule vidis, en la tuta kongresejo preskaŭ 3000 partoprenantoj el diversaj landoj interparolis nur esperante. Kiam mi aŭdis, ke ili parolis esperante tiel facile kaj rapide, mi estas tre ekscitata kaj decidis en mia koro ke ekde nun mi devus pli diligente lerni kaj posedi la lingvon kaj vere fariĝi Esperantistino.

Due, mi profunde ŝanĝis mian antaŭen penson ke mi devus lerni Esperanton nur por vojaĝi. Post tiam mi ekscias, ke Esperanto estas valoraĵo ne nur por vojaĝi per ĝi, sed ankaŭ ke kiel vera Esperantisto oni devus klopode propagandiĝin kaj subteni la Esperantomovadon ĉar Esperanto estas neŭtrala lingvo kaj la vojo por la movado estos tre longa kaj malfacila.

Trie, mi vere ĝuas la amikecon de Esperantujo. Antaŭ mia vojaĝo al Francio, la timeco plenigis mian koron. Kial? Ĉar mi konis neniu en fremdlando. Sed la situacio estas tute malsama ol tiu kiun mi timis. Dum la vojaĝo, ni ricevis helpojn de lokaj Esperantistoj en diversaj urboj kaj ni restis ĉe la domoj de ili. Kelkaj estis malnovaj geamikoj de mia instruistino s-ino Gu. Kelkaj el ili tute ne estis konataj antaŭe, sed tamen ili montris veran amikecon kaj fervore akceptis nin. Tia situacio tute ne estas anticipita afero por mi.

Ekde tiam mi ofte diras, ke Esperanto estas grava parto de mia vivo.

Sanoza el Nanchang, Ĉinio

Nordia somermeza festo

Ĉirkaŭ la somera solstico okazas en Nordio festo, kies nomo varias diverslingve: Juhannus (finne), Midsommar (svede), Jaanpäev (estone)... La Finnlanda festo irigas multajn urbanojn kamparen al feriodometoj, luitaj, propraj aŭ al hejmoj de parencoj aŭ de geamikoj. Turistoj demandas sin, kial la ĉefurbo aspektas strange malplene, kun butikoj kaj restoracioj fermitaj kaj la publika trafiko preskaŭ nenia en Juhannus tago. La buso al la muzea insulo Seurasaari dekon da kilometroj for de la centro de Helsinko, tamen senĉese trafikis tien kaj reen ĝis la unua horo kaj duono nokte. Finnoj, enmigrintoj, turistoj ŝatas veturi al la granda arbarkovrita insulo esperante, ke ankaŭ ili trovos la tradician etoson de la festo. En Seurasaari oni moviĝas piede aŭ per ĉevalo. Pro la sekureco kaj komforto la polico, fajrobrigado kaj liverantoj al restoracio kaj kioskoj rajtas aŭte viziti, kvankam la tuta insulo disponiĝas ĉefe al piedirantoj, infanĉaretoj, ĉaro tirata de ĉevalo, buntaj popoldancantoj, korusanoj en naciaj kostumoj, pli modernaj ensembloj en siaj fantaziaj vestoj. Laŭvoje oni vidas manlaboristojn-montri siajn malnovajn artojn: forĝado, tajlado, trikado, plektado, brodado... Aĉetebblas frandaĵoj kaj senalkoholaj trinkaĵoj. Logas Magia pado, kie sur la arboj aŭ en korbetoj oni

trovas taskojn kaj sciigojn pri mitoj kaj magiaĵoj ligitaj kun la somermezo. Sur la ludeja herbejo oni provas uzi stilzojn kaj la (mal)lerto amuzas la spektantojn. Oni konkuras tirante ŝnuregon de unu fino aŭ de alia por provi, kies teamo venkos. Infanoj spektas pupteatraĵon, plektas florkronojn kun adoltoj el herboj kaj floroj falĉitaj kaj diponigitaj en puŝĉareto. Per siaj plektaĵoj homidoj ornamas stangaron starigotan en la korto de muzea bienego-domo. Pli alta « Majstang » - (festostango), kiu reprezentas svedlingvan tradicion, estis kunlabore-festlabore ornamita jam la antaŭan tagon.

Ĉe granda ruĝa pastorejo svarmas bele vestitaj invititoj al privata geedza festo. La gefianĉoj estas geedzigitaj en muzea gudrita ligna preĝejeto laŭ malnova kristana ceremonio. En la insulo ili iom rondveturas en ĉaro tirata de bela ĉevalo. Sur la portempa breta podio la novgeedzoj valsas kaj komencas la komunan balon. Kiam krepuskas, la novgeedzoj estas veturigataj per dekmetra remboato al flosanta amasego de branĉoj kaj aliaj lignaĵoj por ekbruligi la ĉefan festofajron, la tuta boatanaro en tradiciaj popolvestoj: blanka longmanika bluzo/ĉemizo, diverskoloraj veŝtoj kun brilaj metalbutonoj, ŝnuretoj, striita longa jupo, por viro flava/ruĝa verda aŭ nigra kuloto, tradicia « puukko » (trancilo) ĉe kokso je zono ore brialnta.

Pliaj aliformaj festofajroj (ŝpinil-rado, sunrado, turo...) ekbrulas laŭlonge la bordo. Fajroj kaj fumo leviĝas al la obskuriĝanta ĉielo. Ne ĉiu ĉeestanto sukcesas vidi ĉion, kelkaj plendas. La marbordo estas marĉa aŭ glite roka, la fajrobrigado kaj gardistoj certigas la sekurecon. Mevo ŝvebanta super la fajroj ŝanĝas direkton por ne damaĝi al si la plumojn. Homaj revoj kaj deziroj libere disflugas. Oni ja serĉas amon kaj miraklon en la magia etoso de la junie blanka nokto, kiam la suno nur mallonge restas sub la horizonto aŭ tute ne subniras, kiel okazas en Laponio.

Raita Pyhälä

Kiam oni vagadas laŭ akvobordo,

Kiel ĉiu estas bela !.....

Ho, bela situo ! sunas, maro brilas kviete, ventetas milda sufiĉe por malvarmetigi nin !

Do, ni ekpromenas laŭ marbordo inter maro kaj dunoj.

Dunoj ĉirkaŭiĝas per zono el lignaj fostoj, memoru tion !

Ni marŝadas rigardantaj mevojn, kiuj kriegas, longe rigardas iojn kaj subite plonĝas sur tiujn : eble estas la horo de la manĝo por mevoj !

Ni babilas multe, nombras ŝipojn, tramp-, vel-, fiŝ-, plezur-, rem-, vapor-ŝipojn, ktp.

« Oh ! mi dezirus velŝipon, mi ĉirkaŭirus la teron ! estus mirinde. »

« Ah ne ! mi pli ŝatus plezurŝipon kun taĉmento, jes ! mi estus feria estrino.

Dunoj daŭras, maro daŭras, ni marŝas en la maro, babilas kaj ridas !

Post ĉirkaŭ 2 horoj, ni retroiras. Ankoraŭ, duonhoro pasas, nur nun ni rimarkas ke dunoj daŭras ĝis nevidebleco antaŭe kaj malantaŭe ! Kio similas pli al dunoj ol dunoj ? Kio similas pli al lignaj fostoj ol lignaj fostoj ? Kio similas pli al maro olmaro ? Nenio superstaras el dunoj. Ni vidas nenian fiksan gvidosignon. Ni marŝis, babilis, kontemplis pejzaĝon, mevojn, larojn, sternojn, krabojn, konkajn ktp... sen klare konscii pri la monotoneco de la ĉirkaŭaĵo.

Tamen ĉefe, grava demando estas :

- Kie estas niaj veturiloj ?

Ĉiuj aleoj irantaj ĝis parkejoj similas al aliaj aleoj. Ni vagadas (ĉar nun, ni ne plu scias, kien ni devas iri) ekde proksimume unu horo ni eklaciĝas.

Ni havas nur niajn veturŝlosilojn kaj jam la suno malaltas.

Nia situacio estas ridinda, mokinda tamen ni ne tro ŝatas.

Do ni provas sekvi unu aleon, kiu, ni opinias, eble devus situi proksimume, kie ni alvenis pli frue... Evidente, bedaŭrinde. Ne estas nia parkejo ! Ni reiras al la marbordo (kompreneble, ĉiuj parkejoj punktis inter dunoj kaj oni ne povas iri rekte de unu parkejo ĝis aliaj parkejoj, ĉiam oni devas laŭiri la marbordon.

Ni provas aliajn aleojn... sen sukceso ! Do, al la fino de la kvina aleo, ni decidis peti helpon. Feliĉe, viro eniras en sian veturilon. Ni klarigas al li nian situacion...

Li multe ridegas ĉar ni ne estas la unuaj kiuj spertas tiun aventuron. Afable, li akceptis nin en sian aŭton kaj proponis al ni, viziti aliajn parkejojn pli malproksime. Ni vizitas kvar parkejojn antaŭ ol retrovi niajn veturilojn.

Alfred, tiu viro nomiĝas Alfred, diras al ni : « trankviliĝu, neniu dormas sur la marbordo, ĉar tiu aventuro okazas sufiĉe ofte, por ke ĝendarma ĵipo laŭiras la marbordon dum somero, por kolekti la nesingardajn senatentulojn !

Caroline

La estonteco en la kafa rekremento

Recikligi tiun novan nigran oron por transformi ĝin en « pellets » por stovo por lignaĵo estas inĝenia ideo de la asocio Cassed en la regiono « Les Hauts-de-France ».

Kelkaj diraĵoj de la asociaj membroj :

Mathieu Vandaele, inĝeniera studento : « Tiu recikliigo estas promesplena, ĉar la kafo estas konsumata preskaŭ en ĉiu hejmo ! »

Roger Essono, kunordiganto : « Niaj « pellets » plibone hejtas, malpli rapide konsumiĝas, produktas malpli da cindroj kaj evitas la senarbigon. »

Julien Rybarczyk, komercisto : « Kun mia onklino, kiu estas membro de la asocio, ni rekuperas 7 kg da kafa rekremento ĉiun semajnon. »

En tiu laboratoria domo de Loos- en- Gohelle, departemento Pas-de-Calais, ĉe la koro de la



Mathieu VANDAELE



Roger ESSONO



Julien RYBARCZYK

eksmineja baseno, la kafa rekremento sekigās ekstere, dismetita en lignaj kuvegoj el kesto-paledoj antaŭ ĝia transformado en « pellets » brulivaj. « La varmiga povo de la kafa rekremento estas dufoje pli granda ol tiu de la lignaj granulaĵoj » klarigas Roger Essono, unu el la kreintoj de tiu entrepreno alnomita 62750 Bio Fabrication (Biologia Fabrikado). 62750 estas la poŝtkodo de la urbo Loos-en-Gohelle. Eksinĝenerio pri kvalito en industrio, li lanĉis tiun projekton kun 3 amikoj en 2013 en la asocio Cassed, (franclingve inicialoj de Ch'ti association solidaire, économique et durable; Ch'ti : origina de la norda parto de Francio, asocio solidara, ekonomia kaj daŭra). Subtenitaj de la Franca Fondaĵo kaj poste de la komunumo de Loos-en-Gohelle, tiuj kreintoj validis siajn hipotezojn helpe de lokaj rimedoj fabrikante maŝinon, kiu ŝanĝas la rekremento en « pellets ». Poste, ili pasis al semiindustria fazo kun la AFPA, organizo de profesia formado por adoltoj, ŝarĝita de fabrikado la pecojn de la nova maŝino.

Aliaj ligoj estis kreitaj kun inĝenieraj lernejoj, universitatoj, laboratoj por efektiviĝi analizojn : aera poluado, kimia kombinaĵo... Tiun someron, 3 inĝenieraj studentoj staĝis ĉe Cassed : «Tiu projekto ebligas, ke mi mal-

kovru la medion de la serĉado kaj konkrete komprenu, ke eblas novigi reciklante ! », eksplikas unu el tiuj, Mathieu. Roger Essono rekuperas la rekremento en 30 kolektejoj : rapidaj manĝejoj, restoracioj, kafejoj, kiel la Pierre Paul Jack en la urbo Lens, kie laboras Julien, komercisto feliĉa pro kontribuo al la bona kaŭzo. « En la Hauts-de-France, ĉiu loĝanto konsumas 10 kg da kafa rekremento jare » detalas Roger Essono.

La projekto devus transformiĝi en entrepreno por ke senlaboruloj adaptiĝu al iu laboro kaj dungi dudekon da senlaboruloj. La teamo ekkonceptas malgrandajn stovojn trifoje malpli kostajn ol la tradicia hejto-forno. « Ni estas fieraj montri, ke kolektiva inteligenco povas kontraŭstari la monoponon », orgojliĝas la emerita inĝenerio. En Loos-en-Gohelle, oni estas persvadita, ke tiu loka, ekologia, solidara hejtaĵo ekiras por daŭri.

Fanny Magdelaine.

Traduko de artikolo el la revuo : La Vie, numero 3709 de la 29a de Septembro ĝis la 5a de Oktobro 2016.

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel esperanto-Touraine

Halles de Tours

Place G. Paillhou

37000 TOURS

Tel : 02 47 44 62 12

esperanto-touraine37@wanadoo.fr

<http://esperanto-touraine.olympie.in/index.php?lng=fr>